

# Esperanto estonte en la Bavara Ŝtata Biblioteko

**Okaze de la ekspozicio pri Volapük kaj Esperanto ekfunkciis oficialaj kontaktoj inter Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj la Bavara Ŝtata Biblioteko (BSB) en Munkeno. La 12an de marto surbaze de skriba kontrakto Johann Pachter transdonis parton de la GEA-arkivo pri Esperanto al BSB. La biblioteko ankaŭ estonte akceptos ĉion pri „Esperanto en Bavarujo“. Kompreneble ili transprenas nur zorge preparitan materialon. Tial oni antaŭe demandu, en kiu formo transdono eblas.**

Estis jam multaj diskutoj, kiel savi materialon pri la 100jara historio de GEA. Multegaj dokumentoj dum la jardekoj eniris la rubujon kaj perdiĝis por ĉiam. GEA per siaj modestaj rimedoj de loko kaj kunlaborantoj ne vidis longdaŭran perspektivon en propra arkivo. Laŭdinde Johann Pachter kiel komisiito de GEA jam delonge kolektis ĉion, sed ankaŭ en la oficejo en Berlin la loko estas tre limigita kaj, kion montris brulo antaŭ kelkaj jaroj, ne sufiĉe sekura. Des pli GEA ĝojis, ke pere de d-ro Detlev Blanke la Germana Ŝtata Arkivo montris intereson, komence tamen nur pri ĉiu materialo de GDREA. Gravas, ke la arkivaĵoj estas filmitaj, indeksitaj kaj tiel ankaŭ en la reto estas troveblaj por ajnaj esploroj. Tion nur ŝtata aŭ federaci-landa institucio povas garantii.

Nu, en Munkeno ĉio iris glate, ĉar en la kestoj, kiujn transdonis Pachter, ne estis bananoj, kion oni povus kredi rigardante la bildon, sed valoraj aktuoj. D-ino Andrea Pia Kölbl (meze sur la bildo) ĝoje akceptis ĉion. Ekzemplero de „Maks kaj Morits“ surprizis ŝin pro la profesia kvalito, kiel ŝi komentis. Subskribis la kontrakton flanke de la biblioteko

s-ino Susanne Seemann, respondeca pri akcepto de bibliotekaĵoj. La materialo restos posedaĵo de GEA.

D-ino Kölbl estas la projekt-vidantino en la biblioteko pri la planlingva projekto, kiu konsistas el du subprojektoj. La unua estas granda ekspozicio okaze de la 100a datreveno de la morto de Johann Martin Schleyer, la kreinto de Volapük, kaj la jubileo „125 jarojn Esperanto“. La dua estas

simpozio je 2012-06-15 en BSB pri planlingvaj projektoj, ĉefe pri Esperanto.

Malgranda parto de la donaco jam estas aldonita al la jam preparita, supre menciita ekspozicio. La aktuoj mem estas nun en sekura loko, kie ne plu minacas ilin akvo, fajro aŭ iu alia danĝero. Paŝon post paŝo la materialo estos disponebla en elektronika formo en la BSB kaj, pro kunlaboro kun la Ŝtata Biblioteko de Berlino, estonte ankaŭ tie.

Sur la foto videblas reklamilo pri la kuranta ekspozicio, kaj tie baldaŭ pendos dum pliaj monatoj la afiŝo pri la „Esperanto-Volapük-ekspozicio“, senpaga reklamo por Esperanto.

**laŭ raporto de Johann Pachter**

**Foto: Irina Gerasimova**

